# LA PACDEFENDANTO

N-o.24. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEĤOSLOVAKIO Decembro 1953

# ANTAŬEN SUB LA VERDA STELO!

Pasis jam la dua jaro de la ekzisto de nia nova porpaca esperantista movado kaj ĝia landa organo. Laŭ kutime oni ĉiam okaze de la jarfino rekapitulas la agadon el la pasinta periodo kaj ankaŭ ni volas tiel fari. Kompare al nia situacio en kiu ni troviĝis antaŭ 2 jaroj, ni povas diri, ke ĝi multe pliboniĝis. Siatempe la plimulto de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj fakte imagis, ke la movado en nia lando kaŭze de la likvido de nia centro kaj ĝiaj organoj pereos. Dum la likvida kunveno okazinta tiam en Praha vere nur tute eta parto da esperantistoj kuraĝis rezisti la decidon proponitan de la estraro. Tiu ĉi parto fariĝis la kerno de tutlanda rezistado. Per nia, tiam ankoraŭ modesta organo ni sukcesis alvoki sub nian standardon la grandan plimulton de la ĉeĥoslovaka esperantistaro kaj kuraĝigi ĝin al plura kaj persista laboro sub la devizo „Per Esperanto por la mondpaco"! Kaj kiel Lenin diris: „Kiu volas aliajn ekflamigi, devas mem bruli!" Ankaŭ niaj gek-doj brulis en la koro por nia afero kaj sekve ili ankaŭ sukcesis ekflamigi la aliajn.

Nur malmultaj ankoraŭ flankestaras kaj flaras daŭre danĝeron por sia persono kun enpoŝiĝitaj manoj, sed ankaŭ tiuj baldaŭ ekkuragos eniri niajn vicojn.

Dum la mondekzisto ankoraŭ nenia nova ideo estis unuanime de ĉiuj homoj akceptita, sed ĉiam de-vis de komence kelkaj malmultaj pioniroj ĝin defendi kaj trabatali. Ofte la enradikiĝo de nova ideo kostis multajn penojn kaj oferojn kaj nur la persisteco de ĝiaj propagandistoj kondukis ĝin al sukcesplena venko. El tiuj periodoj ni ĉerpu instruon por nia plua agado. Hodiaŭ ni nur povas konstati, ke malgraŭ la ofte seriozaj malhelpaĵoj ni perdis nek unu grupon en nia lando. Kaj kie fakte la ekzisto de iu grupo estis malhelpata, tiu ĉi trovis novan vojon por sia ekzisto kaj agado. Kontraŭe, en nia lando naskiĝis novaj grupoj kaj novaj adeptoj kiuj plivastigas niajn vicojn kaj apogas ofte eĉ malnovajn, jam laciĝitajn kamaradojn. En multaj lokoj de nia lando hodiaŭ sub la nova devizo niaj gek-doj eĉ plibone kaj pli intensive laboras por niaj celoj ol iam ajn antaŭe kaj aliaj grupoj provas imiti ties ekzemplojn.

Regionaj kunvenoj estas bone vizitataj /ofte eĉ pli ol 100 delegitoj venintaj el plejmalproksimaj lokoj/ kaj kuraĝaj raportoj instigasbilin al ankoraŭ pli efika agado. La efiko de nia agado estas argumentita en tio, ke malgraŭ oni al ni profetis pereon, ni tamen ankoraŭ vivas kaj spite ĉio ni ankoraŭ kreskas. Pri nia bona agado kaj porpaca laboro argumentas ankaŭ la fakto, ke ĵus el nia lando en St. Pölten oni elektis presidanton por la Mondpaca Esperantista movado, kio signifas grandan honoron ne nur por ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj, sed por la tuta ĉeĥoslovaka popolo, ĉar estas unuafoje en la epoko, ke Ĉeĥoslovako estas honorigita fariĝi presidanto de internacia movado kun tia nobla celo.

Jen faktoj, kiuj inter multaj aliaj ne nur klare parolas, sed ankaŭ nin instigu pluen en nia agado! R.B.

Jen unu fazo de la atakado kontraŭ la paco,kiu miaopinie speciale povas interesi la esperantistaron.

Mi aludas la atakadon de la reakciularo kontraŭ la Unuiĝitaj Nacioj Organizo.Multe konata estas la atako de senatoro Mac Carthy kontraŭ la amerikana personaro ĉe la stabo de la U.N.O.rezulte de kio dekunu maldungiĝis spite tio, ke ili estas protektataj de la ĉarto de UNO.

Sed ne tiel vaste konataj estas la ĉiutagaj,senĉesaj atakoj,ĉiurimede farataj por subfosi la influon,povon kaj spiriton de la U. N.O.kies ekzisto estas minacata,

Bone konata,kompetenta ĵurnalisto estis komisiita de fama ĵurnalo dum kelkaj monatoj observadi la atakojn kontraŭ la U.N.O. Li sumigis sian esploron en raporto kaj la informojn,kiujn li prezentas al ni,devus skui ĉiujn homojn,kiuj facilanime akceptas la penson,ke finfine ĉio ĝustiĝos de si mem.

La ĵurnalisto atentigas pri la ŝanĝo,kiu okazis en la ĝenerala sintenado de la UNO dum la 5 jaroj pasintaj. Li skribas:„Kiam tiu ĉi imponega konstruaĵo/la sidejo de UNO/leviĝis,oni ĝojegis,ĉar la impresa ĉefejo estis materia simbolo,ke la usona nacio ne evitos siajn devojn kiel okazis post la I.mondmilito.

Hodiaŭ tiu espero jam fariĝis iluzio,ĉar estas evidente al ĉiu, kiu servadas al UNO,ke tiu mondorganizo estas katenigita al la interna krizo de Usono.Moralo ĝis -fundiĝis kaj la malesperiĝo estas konfirmata per ĉiuj el la kongresejo direktataj atakoj,per minaco de usonaj delegitoj,forlasi la organizon se ĝi ne obeas la usonan diktaton,per la senĉesaj akuzoj kaj mallaŭdoj fare de malamika gazetaro....la kolonoj,kiuj marŝis kontraŭ UNO de kiam ĝi nas -kiĝis grand[illegible]e ŝveliĝis pro aliĝo de ĉiusp[illegible]j malkontentuloj. Famaj filma[illegible]oj,kiuj celagadas por ke la sa[illegible]jra imposto draste malpli-iĝu,politikistoj,kiuj celas kapti kontrolon de la Respublikan-partio,fanatikuloj,kiuj volas forpeli ĉiun„internacian ideon"el la [illegible]ejoj kaj el la publika vivo,partianoj de generalo Mac Arthur, usonaj patriotoj,kiuj opinias ke la virtoj de la nacio estas senĉese sub -fosataj de socialistaj ideoj, malamikoj de sindikatoj,de negroj,Judoj ktp.,ĉiuj trovas komunan fonon en la malamo kontraŭ U.N.O........"La miloj da pamfletoj,bultenoj,gazeteltranĉaĵoj,kiujn mi tralegis dum la pasintaj du monatoj por tiu ĉi aparta observado ĉiuj el ili identigas U.N. Organizon al socialismo - mallonga vojo al komunismo - ,al tunelo por ideologio fremda kaj minaca al la amerikana viv-maniero;kulpigas UNO-n pro la malsukceso en Koreio,pro perfido kaj subfosado;kaj diras"komprenable",ni pagas la kostojn de tiu ĉi aro da fremdulaĉoj!"

Por ekzempligi la specon de kunvenoj,kiuj ofte okazas,la ĵurnalisto citas„Kongreson por libereco" okazigita en urbo Omaha/1-3.okt./ Tiu ĉi kongreso kunigis homojn kies objektivoj estis plej diversaj sed finrezultis en rezolucioj unuanime aprobitaj ...."ke oni ne sufiĉe protektas liberecon en Usono"

"Alte laŭdas senatorojn Mac Carthy, Jenner,Mac Carran."

"Ke la UNO estas organizo senhonta, ne plu tolerebla."

La raporto avertas,ke tiu ĉi amaso da organizoj kaj movadoj estas profesie uzataj por sisteme instigi malamon kontraŭ U.N.O.

El nombro da ekzemploj donitaj en la raporto mi prenas nur du aŭ tri. W.H.Mac Farland,kiu multe atakas la UNO-n,unu el liaj presitaj atakoj kontraŭ UNESKO rapide elvendiĝis je 500.000 kopioj.

Alia estas la aktiveco de homo, nomata Fagan,kiu elverkis dramojn, pamfletojn kaj dokumentojn kontraŭ la UNO. Li denuncis pli ol 100 filmgeaktorojn kiel komunistojn aŭ proksimulojn.Li estas unu el la ĉefaj aktivistoj de la organizo nomata"Kineja Eduka Ligo". Tiu homo travetur-adas la landon paroladante,skribante kaj organizante kontraŭ UNO, kiun li nomas "Ulcero sur la korpo de Usono". Li ŝajnas esti bone helpata finance kaj teknike en tiu laboro kaj fieras fanfaroni,ke li jam en la jaro 1946 kunsidis kun ĉefaj senatoroj kaj ĉefoj de milit-kaj policfakoj/li nomas kelkajn/ kaj planis kontraŭ U.N.[illegible] tiu pretendo lia,ili havis kon[illegible] atestojn kontraŭ UNO,ke ĝi [illegible]

nita de Stalin por ke la Rusoj povu en-kaj eliri Usonon sub la masko de UNO-laboroj.

Tiu Fagan kampanjas tra la tuta lando sub la devizo „Eltiru Usonon el U.N.O.kaj elpelu U.N.O-n el Usono!"

La raportanta ĵurnalisto fine starigas la demandon:"Kiel tiu ĉi ĉarlatano/Fagan/povas altiri al si tian da atento kaj subtenon?"Kiel eblas,ke eĉ respektindaj dignuloj de eklezioj kaj aliaj publikaj aŭtoritatuloj plenvole aperiĝas ĉe lia flanko kaj patronas lian absur-dan ĝis frenezan movadon?" La raportisto donas jenan respondon al sia demando:„La bedaŭrinda fakto estas,ke la aktivoj de tiu ĉi individuo ne malharmonias kun la ŝajna ĝenerala bildo pli vasta.La akuzaĉoj,kiujn li tiel vigle disvastigas,aperas ĉiu tage sur la paĝoj de cent gravaj gazetoj.La gazetoj sin esprimas en iom pli modera tono,sed esence la materialo estas la sama." Al tiu ĉi lasta komento de la raportisto mi speciale volas tiri la atenton de ĉiu progresema esperantisto.

Certe,ke la U.N.O.ne estas perfekta organizo.Oni povus diri kaj subteni tiun diron per sagacaj argumentoj,ke en kampo de mond-politiko la UNO servis kiel instrumento de la usona reakcio.Tamen la si-tuacio ŝanĝiĝis.Kun la progreso de la usona politiko,tutaĉeti kaj kontroli aliajn landojn;Hispanion, Grekion,la subiĝo de aliaj,eĉ la fortan kaj fieran Britio n,produktas situacion,en kiu la UNO fariĝas superflua,eĉ malutila al la plua progreso de la usonaj planoj.Sekve la usona kapitalistaro nun sentime anoncas,ke ili intencas rearmigi Okcidentan Germanion ĉu la aliaj aprobas aŭ ne. -

Multaj el ni povas rememori pri la Ligo de Nacioj; kiel la mondkapitalistaro intrigis kaj malhelpis al ĝi efike labori,kaj poste ĝin atakis pro ĝia senpoveco kaj mokis ĝin kiel parolaĉejon.Ili malhelpis kaj subfosis provojn diskuti malarmigon,sed foruzis monatojn por senutila diskutado pri limigo de grandeco de pafiltuboj.Dum tiuj diskutoj oni demandis la famulon Bernard Shaw:„Ĉu vi aprobas la pro-ponon limigi la grandecon de pafiltuboj al maksimumo 14" ? /oni jam komencis produkti kanonojn de 16" grandeco/.La famulo respondis: „Por mi la rezulto de frapo aŭ de 14" aŭ de 16"kuglego estus tute sama,sed,se oni permesus al mi elekti,mi preferus la pligrandan, la 16",ĉar tiu faras multe pli for-tan eksplod-bruon kaj tiel la afero de mia morto estus pli impona."

Fine la Ligo mortis kaj la cerboj de la publiko estis bone preparitaj ne funebri la eventon.

Unu mortbaton al ĝi liveris tiam ankaŭ la brita registaro,kiu kontraktis kun la germana la malbonan Traktaton de Londono/pri militŝipoj/.Per tiu ĉi traktato la du registaroj ignoris la Ligon de Nacioj kaj insultis ties principojn. La hodiaŭa usona registaro estas ankoraŭ multe pli aroganta ol la tiama brita.

Gravega kaj fundamenta diferenco inter la periodo de la Ligo de Nacioj kaj la nuna U.N.O.estas,ke hodiaŭ monvasta pacmovado ekzistas post kiu staras la Sovet-Unio,Ĉinio kaj ceteraj popoldemokrataj landoj,unuiĝitaj por konstrui socialismon.Ĉi tiuj daŭrigos la batalon por la paco,kiun la kapitalistoj ne povos haltigi.

Ne eblas batali por paco kaj kontraŭ militinstigoj,restante neŭtrala al politiko por milito aŭ por paco! Ĝuste pro tio fondiĝis la Mondpaca Esperantista Movado,ĉar estas evidente,ke nek neŭtralaj landaj asocioj,nek SAT povas entrepreni ĉi tiun taskon.Ni kore invitas ĉiun,kiu opinias,ke Esperanto estu ŝvigata al tiu ĉi plej urĝa kaj plej grava problemo de la nuntempa mondo -la paco - aniĝi tiucele al M.E.M.

C.Fielding-Cardiff

G r a v a   a t e n t i g o

Por la jaro 1954 plialtiĝas la abonkotizo de LA PACDEFENDANTO je 10.-Kĉs.Ĉar ni ne plu ĝuas senafrankan poŝton kaj ankaŭ la materialoj plialtiĝis,neeblas liveri por la ĝisnuna prezo,Insiste ni petas la abonantojn renovigi siajn jarabonon,ĉar sen mono la administracio ne povus funkcii.

La admin.

## REZOLUCIO DE KULTURA KOMISIO

La lasta kunsido de la Mondpaca Konsilantaro klare montris la neceson kaj eblecon por vasta disvolvo de kultura interŝanĝado kiel gravan faktoron por mildigo de la internacia streĉiteco.

Kun ĝojo ni konstatas, ke malgraŭ la tre oftaj baroj estis de tiu tempo jam gravaj rezultoj atingitaj. Santempe ni substrekas, ke ankoraŭ pli gravaj sukcesoj estus atingeblaj dum la nuna tempo. Se ĉiuj organizoj kaj ĉiuj homoj, kiuj havas intereson pri la kulturo de sia patrio kaj en la mondo, decidos arangi kontakton kaj labori fruktodone por internaciaj rilatoj sur la bazo de reciproka interkompreno, malfermiĝos pluaj larĝaj perspektivoj. Por ĉiuj entreprenoj, kiuj jam estis efektivigitaj aŭ estas en preparo, kiel estas vizitoj, interŝango de delegitaro, artistaj verkoj, literaturaj kaj sciencaj publikaĵoj, internaciaj ekspozicioj, kongresoj, kaj renkontiĝoj de scienculoj, psikistoj, artistoj kaj sportaloj, estas la plena subteno de la pacmovado garantiata.

Ni alvokas ĉiujn organizojn kaj ĉiujn homojn, kiuj havas intereson pri la disvolvigo de kulturaj rilatoj inter la nacioj, ke ili pli intensivigu siajn entreprenojn, por ke ilia verko estu ankoraŭ pli efika. /El „RUDÉ PRÁVO" de 30/11.1953/

Ni esperas, ke ne necesas fari pluan komentarion al tiu ĉi grava rezolucio. Ĉiu esperantisto devas kompreni, ke ĝi koncernas precipe nin, niajn organizojn kaj ĉiun unuopulon. Estas nun nia sankta devo batali kaj trabatali ĝian baldaŭan efektiviĝon.

## LA RUSA LINGVO-NE PERDEBLA HELPANTO POR NIA KONSTRUADO

Sub tiu ĉi titolo ni legas fruntartikolon en la centra organo de la ĉeĥosl. komunista partio „RUDÉ PRÁVO" de 28.okt.1953. El duonpaĝa artikolo de granda gazetformato, kiu konsistas el du longaj kolonoj da argumentoj, ni elprenas la enkondukajn vortojn:

„Ne ekzistas plua lingvo, kiu tiom intense kunligas la naciojn al la batalo por nova mondo, kiel la lingvo rusa. Ĝi prave estas nomata la internacia lingvo de la progreso, de la lukto por la nacia kaj sociala libereco, lingvo de la batalo por la paco. En la rusa lingvo eliris la verkoj de la genioj de la Granda oktobra revolucio. Ĝi malfermis la okulojn al la nacioj kaj montris al ili la vojon antaŭen.

La rusa lingvo, forta kaj potenca, eksonas hodiaŭ ĉie tie, kie oni batalas por la paco, por la homa feliĉo, por la socialista estonto. Per la rusa lingvo hodiaŭ interkompreniĝas reciproke la progresema kaj pacama homaro, ĉiuj, kiuj klopodas por kompleta vivo, riĉa kaj hominda sub la sunradioj de paca harmonio. La persistaj rusaj vortoj sonantaj el la mondtribunoj, estas aŭdataj de la pacbatalantoj en ĉiuj mondpartoj kaj de ili fortigitaj, plialten ili levas la standardon por la sendependeco, por la frateco inter la nacioj."

Ni ne komentas, sed ni ŝatus aŭdi la opiniojn de niaj legantoj, precipe el eksterlando, pri tiu ĉi artikolo kaj ĉu ili permesas event. publikigon en nia cirkulero.

## INFANOJ EL LA MONDO

Sub la titolo „Infanoj el Japanio" aperigis granda japana eldonejo tipografaĵon 8 voluman, kompilitan el infanaj skribaĵoj kaj ilustraĵoj de ili mem verkitaj. En ĝi ili rakontas pri sia vivo, la vivo de siaj gepatroj, parencoj, amikoj kaj ĝenerale pri la vivo, moro kaj kutimoj en iliaj hejmaj regionoj. Pri tiuj aferoj ili rakontas tre reale, tute tiel, kiel ili sentas kaj vidas. Tiamaniere estiĝis tre unika kaj valora libraro en kiu respeguliĝas la tuta nuna Japanio, tre utila por edukado. Ĝi estas instrua verkaĵo ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenaĝuloj, ĉar ni povas pli klare ekkoni, dank' al la realaj kaj sinceraj priskriboj kaj rakontoj de la infanoj, kia efektive nia japana patrio estas. El tiu libraro aperis jam ses volumoj. Ĉiuj imponas pro sia beleco kaj riĉa ilustraĵo. La sukceso de tiu ĉi entrepreno sendube estas rezulto de entusiasma penado de niaj progresemaj instruistoj, kiuj dum jaroj, spite la persekuto flanke de ĉiuspecaj reakciuloj instigadis al la infanoj-lernantoj reale verkadi el sia vivo, pri la vivo de siaj

gepatroj ktp. Tiu metodo jam farig-
is en Japanio preskaŭ tradicia.Nov-
aj entisiasmulоj aperadis,precipe
post la lasta militо kaj ili kune
kun siaj antaŭuloj penadis eduki
la infanojn en spirito de amo al
vereco,justeco,libereco kaj paco,in
-ter alie per tia verkado.Jam nask-
iĝis speciala organizo/Asocio/de in
-struistoj,kiuj okupiĝas entusiasme
pri tia edukado per verkado.Ĉiujare
ili okaziĝas konferencon/dum somera
libertempo/,kie entusiasmaj instru-
istoj el ĉiuj partoj de Japanio ra-
portas pri siaj spertoj,interŝanĝas
opiniojn kaj diskutas kiel pliboni-
gi kaj pli vigligi ĉi movadon.
Pro la granda sukceso,kiun atin-
gis la eldonejo de tiu ĉi libraro,
ĝi konsentis,instigite de progresem
-aj esperantistoj kaj instruistoj
eldoni en la 1954.jaro similan lib-
raron sub la titolo„Infanoj el la
mondo",kiu konsistos el verkoj kaj
ilustraĵoj de infanoj el ĉiuj land-
oj.Ĉi foje oni presigos krom la in-
fanaj verkoj kaj pentraĵoj,ankaŭ po
-polfabelojn kaj legendojn raporti-
tajn de la infanoj mem.
Ĉu ne estos tio bona kaj utila la-
boro por interfratiĝo kaj mondpaco?
Sed tia entrepreno nur povas suk-
cesi per la aktiva kaj oferema kun-
laboro de la esperantistoj el la tu-
ta mondo.Samtempe niaj gek-doj bone
servos per tia kunlaboro al sia pat-
rio,al la amikiĝo inter la popoloj,
kiu sola povas garantii la mondpac-
on. Ili ankaŭ dokumentos la prakti-
kan valoron de Esperanto kaj ĝian
nepran bezonon por internaciaj rila-
toj. Ni do insiste petas la espe-
rantistojn,organizi jam nun la ko-
lektadon de la tie cititaj infanaj
verkaĵoj aŭ aranĝi rektan kores-
pondadon inter siaj kaj japanaj in
-fanoj.La infanoj raportu pri sia
vivo en la hejmo,lernejo ktp.Pri
lokaj kutimoj,moroj kaj festoj.An-
kaŭ la spertoj de la infanoj dum
la milito kaj okupado fare de ger-
manaj faŝistoj estus tre dezirataj
temoj. La verkoj estu realaj,fakt-
aj kaj neniel abstraktaj.

T.Kurisu

Rim.de red.: Ni gratulas al la jap.
esp-istoj instruistoj pro tiu suk-
ceso kaj samtempe ni vokas al ĉiuj
niaj pacdefendantoj,ke ili tuj ek-
paŝu al kunlaboro por tiu ĉi entre
-preno. K. arigu al viaj infanoj
/ankaŭ al e scipovaj Esp-on/la al
-tan signi .n de tiu afero kaj in-
stigu ilin al entusiasma verkado !
Ili povas ankaŭ nacilingve verki
siajn raportojn kaj per via helpo
ili estu tradukotaj.Instigu ilin
verki raportojn pri kio ili memor-
as la germ.faŝistan okupadon de Ĉ.
S.R.,la lastajn atakojn de la Ame-
rikanoj,kiuj bombdetruis niajn uzi
-nojn kaj hejmojn,kiel ili rigardas
la militon kaj kiel ili sopiras ha
-vi rilatojn kun infanoj el aliaj
landoj.
Ĉiujn verkojn sendu rekte al k-do
Togo Kurisu,Himonyi 2-2298,Meguro-
ku,TOKIO,Japanio.
K-don.Kurisu ni demandas,ĉu tiu ĉi
libraro eldoniĝos Esperant-lingve?
Se ne,ĉu estas ŝancoj ĝin en Japan
-io aperigi? Certe en la mondo tro-
viĝos multaj interesuloj,kiuj ĝin mendus kaj
tre verŝajne eĉ tradukus en aliajn lingvojn.

---

## „ P A C O "

la oficiala organo de la Mondpaca
Esperantista Movado/MEM/ estis kune
kun nia lasta n-o./nov./ekspedita
al ĉiuj pli gravaj lokoj de nia lan
-do,entute al 200 gek-doj samtempe
kun la aliĝilo.La PACO eldoniĝos ĉiu
monate en alia lando.La ĉeĥosl.PACO
eldoniĝos en februaro.Bonvolu bald-
aŭ resendi la aliĝilon kun la koti-
zo 8.-Kčs por 12 n-oj.En okazo,ke vi
ne deziras aboni bonvolu transdoni
al alia interesulo aŭ resendu al nia
redakcio por ke ni povu ĝin sendi al
alia interesulo.Kelkaj jarabonoj es-
tas ankoraŭ ĉe ni mendeblaj.La nov.
PACOn bonvolu prunti al viaj gek-doj!

## ANKAŬ BULGARIO REVEKIĜAS

K-do.Borislav A.Velev el Gore Del-
ĉev skribas al ni:
„En nia urbo mi lastatempe sukce-
sis varbi 7-8 lernantojn,kiuj mon-
tras grandan intereson por Esperan
-to.Eble mi sukcesos poste fondi
societon kiam mi ricevos permeson
de la lokaj ofic.organoj.Fakte la
landa Esp-movado estas dormanta,
sed tiu ĉi stato ne daŭros eterne.
Ni klopodos pruvi,ke Esperanto po-
vas bone servi al porpacaj kaj so-
cialismaj ideoj.
Rim.: Estus dezirinda,ke ankaŭ en
la ceteraj lokoj la bulg.k-doj ek
komencu labori!

NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

LIBEREC, la Esp-rondeto če la sindikata klubo de fervojistoj kunvenadas regule ĉiu marde de 20.horo en la klubejo Leninova tř.518/4a. La 12.de decembro okazis Zamenhof-vespero kaj samtempe Kristnaskofesto. Funkcias kurso sub gvido de k-do.Fr.Pytloun. Ekspozicio pri tutmonda pacdefendo estas en preparo.
Prakovce, al tiu ĉi urbo translogiĝis nia tre vigla k-do D.Kostolný el Svit Post ne longe fondiĝis Esp-rondeto en lia nova laborejo-Mašinfabrikejo de Prakovce, kun 18 membroj/ĉiuj pres-kaŭ komencantoj/, kiuj samtempe vizi-tas kurson funkciantan ĉiu merkrede de 15.45 horo en la uzina biblioteko. Dum la fonda kunveno la 18.11. 1953 estis elektitaj kiel pres.k-do. Pindroch Vlastislav, anstataŭanto k-do Kostolný Dušan kaj sekretarino: Zuzana Budinská, kasistino: Helena Andrášová. La sindikato ebligis eldonadon de perfekta informilo, kiu aperadas dufoje en la monato de komence en slovaka lingvo kun aldono de instruaj lekcioj. Redaktas k-do Pindroch. Jen nova loko en nia lando, kie Esperanto enpenetris montrante bonajn perspektivojn por la estonto. Ni gratulas al la novaj pacdefendantoj kaj invitas aliajn al imito.
PLZEŇ, la 16.12.okazis membra kunveno en gastejo"U Fišerů", Sedláčkova 39. Partprenis pli ol 20 gek-doj. K-do Burda raportis pri la agado de MEM kaj la en aliaj eksterlanda E-movado. K-do.Reiser invitos pli ol 80 membrojn renoviĝi siajn jarkotizojn.
OPAVA, funkcias du kursoj por komencantoj. La unuan vizitas 16 geknaboj kaj la duan 20 maturaj homoj. Krome funkcias regulaj konversacioj por progresintoj. La rondeto havas siajn reprezentantojn en la nacia packomitato. Dum distrikta konferenco de pacdefendantoj okazinta la 29. 11.1953 parolis k-do.Frantl pri la fruktodona agado de esperantistaj pacdefendantoj, la Renkontiĝo en St.Pölten kaj entusiasmigis ĉiujn ĉeestantojn. Dum la tagmeza paŭzo efekta ekspozicio dokumintis nian agadon.
BRNO, la 15.12.arangis la Esper. rondeto če la kultura klubo de Komenský en Spegula salono de hotelo SLOVAN grandan koncerton okaze de la 94 jara naskiĝtago de d-ro.Zamenhof. 8 artistoj funkciis senpage kaj multnombra partopreno de niaj samideanoj ilin rekompencis.
KOPŘIVNICE, la 2.de decembro komenciĝis kurso kun 12 komencantoj.
MLÝNY p.KYTLICE, en tiu loko estas ĝis nun unu sola nia k-do, Karlo Svoboda. Li jam depost 3 jaroj en publika šranketo ekspozicias regule propag.materialon, sed ne sukcesis ankoraŭ aranĝi kurson. La čsl.gek-doj.estas petataj konsili kaj helpi, la eksterlandaj subtenu per propag.materialo. Adreso: Karlo Svoboda, Mlýny pošta KYTLICE, Čeĥoslovakio.

KORESPONDI DEZIRAS:

K-dino.Magdalenine VAGANAY,/18jar,/ 85 Cours Tolstoi, VILLEURBANNE, Rhône Francio, nur kun junulinoj per il. poštkartoj.
K-do.K.TOMAN, Hrádek č.63, u SUŠICE, Čeĥoslovakio, kun č.landoj il.p.k.
K-do BĪNA Ludvík, Okružní č.642, ZRUČ nad Sázavou, Čeĥoslovakio, interšanĝas p.m.kun sportaj motivoj, aerpoštajn il.p.k.precipe kun aŭstriaj gek-doj filatelistoj
K-do.TÕKA Jozsef,/14 jara/Berkesd.hsz.69, Baranya m.PÉCSVARADI J, Hungario, pri ĉio kaj interŝanĝas il.p.k.kaj p.m.kun č.l.
1 ANONCO KOSTAS 2.-KČS-2 resp.k.

MUNICIO POR NIA BATALO :

K-do.Fr.VOLDŘICH-Hor.Dvořiště 12.-Kčs
K-do.Inĝ.Chobola-Kunčice..... 2.- "
K-do.Csáder-Bratislava ...... 2.- "

Eldonas: OSVĚTOVÁ BESEDA OSTRAVA-ZÁBŘEH, ODBOR ESPERANTO „KOMENSKÝ".
Redaktas: Kdo. Rudolf BURDA, PLZEŇ, Palackého náměstí č.6.
ČEĤOSLOVAKIO